

RECENZO (rh)

Gunther von HAGENS (DE)

"Korpomondo - La fascineco de la malfalso"

Katalogo de la ekspozicio, 8-a eldono, 1999, Heidelberg (DE)

Prof. Dr. med. Gunther von Hagens

Dr. med. Angelina Whalley

Suplementa volumo de la katalogo, 1999

Institut für Plastination, DE 69126 Heidelberg

Gvidilo tra la ekspozicio, 2a eldono 1999

Institut für Plastination - Basler Zeitung (CH)

Atentigo pri la ekspozicio "La mort n'en saura rien", 1999-2000,

Musée National des Arts d'Afrique et d'Océanie, Paris (FR)

Tiu ekspozicio de *Gunther von Hagens* estas evento de granda publika intereso. En Tokio kaj Osaka (JP) 1995 vizitis ĝin pli ol 2 1/2 miliono da homoj, en Mannheim (DE) 1997/98 ĉ. 780000 kaj en Wien (AT) 1995 560000. En Basel (CH) la dauro estas plilongigita ĝis en 2000.

Von Hagens pluenkondukas la renesancan tradicion de *Leonardo da Vinci* (1452-1519) kaj de *Andreas Vesalinius* (1514-1564), kiu ekkonis, ke la beleco de la korpo baziĝas sur la funkcionalaj strukturoj de ĝia internaĵo; kiel kuracisto de imperiestro Karl V, li kreis la unuan precizan libron pri la homa anatomio (*De fabrica humana corporis*). Pli poste *Lodovico Cigali* (1559-1613) montras, figure de *'La scorticato'*, kvazau klasikan belecon de la muskolo-estetiko.

'La anatomia dissekciado pli malfermas al ni la profundecojn de la naturo ol ĉiu alia klopodo au kontemplado' (*Johann Wolfgang von Goethe*).

La ekspozicio montras pli ol ducent homdevenajn plastigajojn; videblaj estas kompletaj homaj korpoj, transvideblaj korpodiskoj kaj diversaj organoj, sanaj kaj difektitaj.

Anatomio estas la dissekcado de anonimigitaj mortintoj au - se oni volas esprimi - kadavroj por videbligi la strukturon de la homa korpo. Mortinto estas, lau civila leĝo, senmastra havaĵo, kiu tamen estas submetita al specifaj reguloj; ankaŭ 'la anatomio' havas nur limigitan posedajosimilan rajton, la postmorta personecoraĵo restas netuŝita. Pro tio estis kaj estas antaŭkondiĉo de ĉiu transformado, ke mortinto au mortonto dumvive faras la testamentan korpodonacon al la *Heidelberg*-a Instituto por Plastinigado (fondita en 1994). Ekde 1986 antaŭtransdonis 942 homoj de ĉiuj aĝokategorioj siajn korpojn al la plastinigado (524 virinoj kaj 418 viroj).

Konservado de molaj parto specife de organoj por medicina uzo okazas ekde 1893 per formalino; la tutkorpa konservado de kompletaj homaj korpoj ne multe progresis depost la egipta mumiiizo, kun kelkaj esceptoj. Artajo estis ekz. la rajdanto sur ĉevalo (*'Chevalier de Fragonard'*) de la franca anatomo *Honoré Fragonard* (1732-1799), kiun li kreis per injekto de Wood'a metalo en la arteriojn. Por li estis la anatomio ne la helpscienco de la medicino, sed ties estetika kronado. Ekde 1914 oni uzis parafinon; konata eksperimento ankoraŭ ekzistanta estas la konservado de la *Lenin*'a korpo. La apliko de polietilenglikoloj liveris en la 1950aj jaroj sekopreparajojn. Sed nur per la plastigado povas okazi simbiozo inter anatomio kaj arto, ĉar per tiu procedo la malkomponiĝo kaj elsekiĝo estas tiom haltigita, ke la esenca estetiko de la homa anatomio konserviĝas. Sekve de la korpa stabileco de la preparajoj eĉ eblas certa vivproksima prezentado lau normalaj pozicioj el la ĉiutaga vivo, ekz. kiel ĉe rajdanto au kuranto.

Por multaj vizitantoj signifas tia konfrontado kun la korpo de mortintoj kontempladon pri la fineco de la vivo, pri la misuzo de la korpa beleco, kaj antaŭ ĉio pri pli bona observado de la propra saneco. Pro tio gravas elmontri la malsaneco-kauzitajn modifojn de la diversaj organoj (ekz. fumintopulmo). Ankaŭ la preteco al postmorta organodonaco rimarkeble pligrandiĝis post vizito de la ekspozicio, kaj lau pridemando ekestas ankaŭ perforto-preventa influo.

Tiu ekspozicio provokas per iu specife materia konfrontado. La konservado de kadavraj partoj estas ekde jarmiloj praktikita en ĉiuj kulturoj kiel deziro al pluekzistado. Sed la senvualigo kaj la transvidebleco helpe de trarigardeblaj sekcaĵoj estas provoko, ĉar la plastikajoj evidentigas konfliktzonon de niaj tabuo-konceptoj, ĝuste se temas pri estetika ĝuo, perita en tia maniero.

Von Hagens estis ĝis 1975 asistento-kuracisto pri anesteziado kaj urĝkazo-medicino. Li patentis la plastinigan metodon ekde la jaro 1977 ĝis 1982; sed la plastinado de tutaj korpoj sukcesis unuafoje nur en 1990.

Necesas du interŝanĝoprocezoj: unue estas forigata la korpo-akvo, el kio la novnaskito konsistas je du trionoj, la maljunuloj ancorau je ĉ. 58 %. Tio okazas per malvarmigita acetono, kiu poste estas anstataŭata per hardeblaj plasto-likvaĵoj. Oni uzas gashardeblan silikonkaŭĉukon, varmhardeblajn epoksidrezinojn, ultraviolhardeblajn miksaĵojn surbaze de poliesterrezinoj. La artifiko konsistas en la apliko de vakuoimpregnado, per kiu la forŝucita acetono estas anstataŭata iom post iom ĝis en ĉiujn disbranĉiĝojn de la angioj. La organoj devas esti antaŭe senĝrasigitaj sen ŝanĝo de la volumo.

Por videbligi ekz. la plej fajnajn disbranĉiĝojn de la angioj estas aplikata la specifa tekniko de t. n. korodo-preparaĵo; tio signifas, ke oni laboras per fermentoj, kiuj kvazau 'fordigestas' ĉiun aliajn substancojn, sed ne atakas la plastaĵojn; tiel postrestas ankau la plej fajnaj angioj, antaŭe plenigitaj per plastolikvaĵo.

La nervoj kontraŭe devas esti antaŭ la hardigo elpreparitaj kaj poziciigitaj kun granda ekzakteco, por ke ilia strukturo restas konservita, alie la substanco de la nervoj estus detruita au dissolvigita. Tiel eblas reliefigi kaj akcentuigi la trasangigon kaj tranervigon de organoj kaj de aliaj partoj de la korpo.

Gravas ne nur la kolorkonservado, sed ankau konvena kolorigo. Serio de sekcaĵoj havas parte nur dikecon de 3,5 mm. La daŭro etendiĝas de tagoj ĝis semajnoj, tutkorpa plastinado bezonas 1500 laborhorojn. La sperta teknikoartisto devas koncepti la finan formon tiom perfekta, kiom la skulptisto vidas la skulpturon jam en la bloko de marmoro. La arta produkto estas, ĉe la plastinado, multe pli la

reprezentado de vivita vivo, ankau en konekso kun la profesia pozicio ekz. rilate al la muskoloj kiel dancistino au rilate al la nervoj kiel ŝakludanto. Grandiozan impreson faras la preparaĵo de la brakokaj manoarterioj. Pro la genetike diversa destino de ĉiu homo sekcoj de la korpo au de iu organo estas ĉiam esprimo de specifa personeco, ankau se ili estas same aranĝitaj. La plastina ekzisto estas kvazau konservita stato inter mortado kaj malkomponiĝo.

Eblas ankau la plastinado de la hauto, sed tiu estas ĝenerale forigita el kaŭzo de personeca identifikado, tamen kelkfoje konservata, ĉar la metodo ebligas tre precizan prezentadon de la superfica reliefo kaj de la ĉelostrukturoj ĝis en la mikroskopa sfero.

La neĉeesto de la hauto, la plej granda kaj la plej peza organo, elmontras la sensirmecon de la homo. Ĝuste pro tiu manko de la hauto, 'vestaĵo de la karno', ekestas la riproĉo de la muskoloestetiko. Aliflanke ekestas estetike instruiva ŝoko pri la majstroverko de la korpointernaĵo.

La kontraŭuloj de tiu ekspozicio atakas plejparte certan etikuman prezentadon samtempe sciencan kaj artan. Fakte ekzistas en hodiaŭa tempo certa korposuperestimo, kiu manifestiĝas kiel fetiŝismo de la rigardado.

Sed oni rajtas demandi, al kio servas ekz. la senpietata ostejo, konstruita de monaĥo en la Kapuceno-preĝejo de la *Via Veneto (Roma)* kun kolonoj el kranioj, lustroj el vertebroj. Kiu kontraŭe vizitas la ostejon ĉe *Verdun (FR)* certe ne havas la impreson, ke tiu memoraĵo pri la interkapitalisma buĉado de la unua mondmilito estas senpietata; abomeninda estas la masakrado, kiun enscenigis kaj celebris la religiaj, politikaj kaj militaristaj krimuloj helpe de mensogaj frazoj pri dioj kaj patrioj.

Dum certaj aŭtoroj skribas pri la estetiko de la milito, oni kritikis, ke la estetika prezentado de mortintoj estas fremda celo; tiuj cirkloj interpretas la etikigadon kiel ofendon de la homa digno, ĉar ili preferas la falsan heroismon de la militmonumentoj kun belvestitaj imperiestroj, ne kun krevintaj senhautigitaj soldataj kadavroj. La preteksto, defendi la homan dignon, utilas por la hipokritaj ritoj de la ekspluatantaj klasoj nur tie, kie ĝi taugas por la samtempa defendo de profito kaj propra prosperigo.

Sed kio estas la celo inheranta al kadavro - estas la putrado, la kremaciado, estas la glaciigo au la lanĉado en la spacon, estas la elmonro de ornamitaj skeletoj de martiroj au sanktuloj en preĝejoj - au povas esti ankau iu formo de plastigado? Ni do konfesu, ke la sola celo, en la saneca intereso de la postvivantoj, estas la higieno konvena forigo. Sed tio, kio estas ekspoziciita nun ne plu estas kadavroj, sed plastinaĵoj, ĉar inter la stato kiel mortinto kaj kiel ekspozita okazis transforma proceso pri la entute 60 bilionoj da ĉeloj de la homa korpo. La rezulto cetere estas seka, firma, senodora kaj eĉ daŭra - do vere higiena lau difino de la 'leĝo pri epidemioj'.

Normale ekzistas la difino, ke mortinto en la stato de malkomponiĝo restas tiom longe kadavro, kiom ĝia anatomio restas ekkonebla, ĉe skeleto (σκελετον = la elsekigaĵo) la anatomio ĝenerale ne plu estas ekkonebla. En tiu diferenco ekzistas la argumento de la kontraŭuloj. Pro tio la burĝaj adeptoj de la t. n. 'bona gusto' akceptas iun 'templon de la morto' el la ostoj de 8000 Burgundaj solduloj au la milojn de transatlantikaj kranioj en europaj muzeoj, ĉar ili ne plu havas la aspekton de homoj, kvankam ili salutas la vizitantojn de la ostejo de *Naters* (CH) per la admonon: 'kiaj vi estas, tiaj ni estis - kiaj ni estas, tiaj vi estos'.

La konservativa *FAZ* (*Frankfurter Allgemeine Zeitung*) moketas, ke *von Hagens* montras ĉiujn organojn, sed ke la animo ne troviĝas inter liaj ofertoj. La animo estas memoro; eble troviĝas ankoraŭ restantaj memoreroj en la cerbo, sed ili estas el mortintoj ne plu revokeblaj.

La arto ŝanĉeliĝas inter vivo kaj morto. *Salvador Dalí* (1904-1981) pentris la enrigardon en la korpon per tirkestoj de la 'antropomorfa ŝranko'; *von Hagens* ekprenis tiun ideon ebligante al ĉiuj, kiuj volas ekscii pli, enrigardon en la paseman korpan restejon, kiu iam ne plu havas la kvaliton de subjekto.

